


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafthijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

LETERO DE JOĈJO.

Joĉjo estis sesjara. Ambaŭ genuoj rigardis tra la pantaloneto. Liaj haroj estis blondaj, bukaj kaj tiom densaj, ke estis sufiĉe da ili por du kapetoj. Liaj grandaj, bluaj okuloj volis ridi, kvankam jam multe ili ploris. Lia bluzeto havis bonan fasonon, sed estis disŝirita. Sur unu piedo li havis boteton, sur la alia ŝuon. Kaj ambaŭ estis tro longaj, tro larĝaj..... tro eluzitaj!

Li malsatis kaj soifis, ĉar estis vintrovespero kaj ankoraŭ li ne manĝis de post la antaŭan tagon je la dekdua, — kiam li ekpensis skribi leteron al la feino Madelena. Ŝi estis la bona feino, kiu en la fabeloj de la patrino ĉiam faris bonan finon al la aferoj. Nun mi diros al vi, kiel la malgranda Joĉjo, kiu ne povis legi, nek skribi, pretigis sian leteron.

Angule de la strateto estis la kelloĝejo de letterskribisto, iama soldato — grumblulo, sed kun koro el oro. Joĉjo vidis lin tra la aĉaj fenestrovitroj, atendanta klientojn kaj fumanta. Li eniris kaj diris:

„Bonan tagon, mastro! Mi venas skribigi leteron.”

„Tio kostas unu frankon,” diris mastro Buin.

Joĉjo ne havis ĉapon, do tiun li ne povis depreni, sed tre ĝentile li diris: „Vi pardonu min!”

Kaj li malfermis la pordon por foriri, sed li plaĉis al mastro Buin, kaj ĉi lasta demandis:

„Ĉu vi estas filo de soldato, knabeto?”

„Ne,” respondis Joĉjo, „mi estas filo de mia patrino kaj ŝi estas sola.”

„Hm,” diris la skribisto, „kaj ĉu vi ne havas frankon?”

„Ho ne, mi ne havas eĉ centimon.”

„Kaj ĉu ankaŭ la patrino ne havas? Sed tion mi ja povas vidi! Estas certe letero por peti ion, supon aŭ ion similan, ĉu ne, bube-to?”

„Jes,” respondis Joĉjo, „ĝuste.”

„Nu do, dek linioj kaj paperfolieto ne malriĉigas homon!”

Mastro Buin prenis paperon, metis la plumon en la inkon kaj skribis plej bele:

Parizo, 17 Januaro 1857.

Al Sinjoro.....

„Diru, kiel li nomiĝas?”

„Kiu?” demandis Joĉjo.

„Nu, la sinjoro.....”

„Kiu sinjoro?”

„La sinjoro de la supo!”

Nun Joĉjo komprenis kaj respondis:

„Ne estas sinjoro!”

„Nu! Sinjorino do?”

„Ankaŭ ne! Jes, mi volas diri.....”

„Diable!” kriis mastro Buin, „ĉu vi mem ne scias, al kiu vi volas skribi?”

„Certe,” diris la infano.

„Diru do, kaj rapide!”

Joĉjo estis fajroruĝa. Sed li kolektis sian kuraĝon kaj diris: „Mi volas skribi leteron al la feino Madelena.”

Mastro Buin ne ridis. Li formetis la plumon kaj prenis la pipon el la buŝo.

„Knabo,” li diris severe, „mi pensas, ke vi ne intencas primoki maljunan homon. Vi estas tro malgranda por ricevi batojn. Foriru —, kaj iom rapidu!”

Joĉjo obeis kaj volis foriri. Sed mastro Buin, vidante lian malĝojon, jam bedaŭris, ke li ekkoleris.

„Kiom da mizero en Parizo,” — li murmuris. „Via nomo, bube-to?”

„Joĉjo.”

„Kaj plie?”

„Ne pli ol Joĉjo.”

Mastro Buin sentis ion en la okuloj, sed levis la ŝultrojn.

„Kaj kion vi volas diri al la feino?”

„Ke mia patrino dormas jam de hieraŭ je la kvara kaj la feino veku ŝin — ĉar mi ne povas.”

La koro de la maljunulo kuntirĝis, ĉar li timis kompreni. Tamen li demandis: „Kial vi parolis pri supo?”

„Nu”, diris la infano, „ni bezonas ĝin! Antaŭ ol ŝi ekdormis, la patrino donis al mi la lastan panpecon.”

„Kaj kion ŝi mem manĝis?”

„Jam du tagojn ŝi diris, ke ŝi ne malsatas.”

„Kion vi faris por veki ŝin?”

„Kion mi ĉiam faras: mi kisis ŝin.”

„Ĉu ŝi spiris?”

Joĉjo ridetis kaj aspektis treege dolĉa.

„Tion mi ne scias,” li diris, „ĉu oni do ne ĉiam spiras?”

Mastro Buin deturnis la kapon. Li timis, ke Joĉjo vidos la du grandajn larmojn, kiuj kuris al li sur la vangoj. Li ne respondis la demandon de la infano, sed demandis tremvoĉe; „Kiam vi kisis ŝin, ĉu vi tiam ne rimarkis ion?”

„Ho jes! La patrino estis malvarma. Estas ja tiom malvarme ĉe ni!”

Mastro Buin pensis: „Mi enviis la riĉulojn — mi, kiu bone povas manĝi kaj trinki! Kaj jen mortas iu pro malsato..... pro malsato!”

Li vokis la knabeton, prenis lin sur la genuojn kaj diris milde: „Joĉjo, la letero estas skribita, kaj forsendita kaj ankaŭ ricevita. Konduku min al la patrino!”

„Bone, sed kial vi ploras?” mire demandis Joĉjo.

„Mi ne ploras,” respondis la maljuna soldato, firme premante lin. „Ĉu vi pensas, ke viroj ploras? **Vi** ploras, Joĉjo, kompatindulo .. Sed, ĉu vi scias, ke mi amos vin, kvazaŭ mi estus via patro? Komprenu — ankaŭ mi havis patrinon! Estis antaŭ longe. Sed nun mi denove vidas ŝin kuŝi sur la lito, aŭdas ŝin diri, antaŭ ol ŝi foriris: „Buin, estu brava viro kaj bona homo.”

Li ekstaris kaj tenante la infanon surbrake, li diris: „Rigardu patrineto, kaj estu kontenta!”

De tiu momento Joĉjo restis ĉe la maljuna soldato, kiu amis kaj prizorgis lin kiel patro.

trad. VANE.

Restis ankoraŭ kelkaj kovriloj de ambaŭ ĵarkolektoj. Prezo po 10 cendoj.

PANJO, „SUNETO” ESTAS AMARA.

Per nudaj piedetoj, kun nekovrita blondhara kapeto — tiel la eta Sarmito kuradas tra oraj leontodo-kampoj. Subite ŝi ekhaltas; la okuloj ĝoje ekbrilas kaj de la lipetoj gaje eksonas: „Suneto!” Laŭlonge de lageta bordo, sur riĉa verda herbejo, estas disŝutitaj miloj da ruĝetaj kaj flavetaj folioj, inter kiuj amase brilas grandaj flavaj floroj (leontodoj). Sarmito kliniĝas, deŝiras floron, alŝovas ĝin al sia nazeto kaj poste komencas atente ekzameni ĝin. Sur la pale verdeta (iom ruĝeta) finaĵo de l'floro estas blanka gutto. Tio kaŭzas al Sarmito egan miregon: Kiel, kaj de kie povas aperi la lakto? Ŝi faras seriozan, esploreman mienon, forprenas la guton kaj elverŝas ĝin per la manplato. Poste ŝi prenas per unu mano la floron ĉe l'kapo kaj per la fingretoj de la alia mano ŝi ekpremas la trunketon, kaj malrapide tiras malsupren. En la finaĵo ree aperas blanka guteto, kiun Sarmito denove forprenas. Kaj tiel ŝi ankoraŭ provas tiradi la trunketon, sed vane, la lakto ne plu fluas. „Suneto, flavulo, donu ankoraŭ lakton?” Sed kiam ĝi ne plu aŭskultas, ŝi ĵetas la floron sur la teron kaj komencas deŝiri kelkajn aliajn, disrompas la trunketojn, kaj ĵetas ilin for. Fine tio tedas ŝin, sed momenton pripensinte ŝi deŝiras ankoraŭ unu floreton. En la finaĵo aperas granda, blanka gutto. Momenton ŝi ridetante observas ĝin; la langeto lekas la lipetojn, ekbrilas la okuloj, malfermiĝas la buŝeto kaj la maneto prenas la floron ĉe la kaliko, alproksimiĝas la trunketon al la buŝo, kien la guteto malaperas, post skarlataj lipetoj..... Sed ho, kio okazis! La vizaĝeto de Sarmito fariĝas maljuna, la maneto forĵetas la floron, kaj la piedetoj komencas bati la teron, kvazaŭ ili devus danci sur varmegaj brikoj, sed la buŝeto sputas: Tpu, tpu!..... Tpu, tpu! Sarmito kuras trans rikoltita terpomo-kampo. Ĉirkaŭe brilas la floroj kaj la patrino kaŭras ĉe kamp-rando kaj kolektas terpomojn en korĉon. Sarmito rigardas la flavajn leontodojn, „sunetojn”, kaj sputas, sed la floroj brilas tiom gaje kaj ĝoje, kvazaŭ ili ridetas pri la malfeliĉa Sarmito.

„Panjo, panjo, mi trinkis lakton, sed ĝi estis amara!”

„Kie do vi prenis tian lakton?” demandas la patrino.

„Jen tie,” montras Sarmito malantaŭ si al la ora florkampo, „tie ili estas multaj.”

„Kaj vi malsaĝulino provis ĝin? Ĉu estis bone? Nu, iru hejmen kaj formanĝu la panon, tiam ree fariĝos bona!”

Kaj Sarmito forkuras al la domo.

Siberio (trad. el la Latva, M. M.)

BALTPARVINŠ.

LA MALJUNA LEONO.

Hagenbek, la konata komercisto pri sovaĝaj bestoj, rakontas en sia libro „Pri bestoj kaj homoj” jenon: En la malferma rabobesta kaverno en Stellingen apud Hamburgo oni povas vidi maljunan leonon, kiun mi posedas jam dek ok jarojn. La nomo de tiu maljuna sinjoro estas „Triest”; per tiu nomo ni baptis lin, kiam li alvenis ĉe ni post vojaĝo tra Triest. Li estas granda Somali-leono, tre bela dum sia junaĝo, kaj nun ankoraŭ majesta. Li estas artisto laŭprofesie kaj vidis grandan parton de la mondo dum siaj vojaĝoj. La mondekspozicioj de Chicago (ĉikego) en 1893 kaj tiu de St. Louis (san Lui) en 1904 havis la honoron gastigi lin. Nun li ne plu laboras kaj li vivas pli bone ol multaj maljunaj artistoj inter la homoj. Sed Triest meritas tion. Li estas malsovaĝa kaj fidela kiel hundo, kaj mi interrilatas kun li kiel kun hundo. Pasintan someron mi rimarkis kun malĝojo, ke mia maljuna amiko lamas kaj suferas doloron kaj iĝas malgrasa. Mi esploris lin kaj vidis, ke je ambaŭ postaj piedoj du ungoj kreskis en la karnon.

Vi opinias, ke necesis malfacila operacio; ke oni devis ligi la beston kaj preni ĉiajn antaŭzorgojn. Nenio pri tio, ĉar al Triest oni rilatas kiel al afabla, racia homo. Ni kuŝigis lin, fortranĉis la ungojn per akra pinĉilo kaj tiris ilin el la karno. Dum la operacio, kiu estis tute ne sendolora, la besto kviete kuŝis. Dum kelkaj tagoj ni bone lavis la vundojn, kaj ili resaniĝis. Kaj Triest estas nun ree sana, sentas sin bone, fariĝas pli dika kaj vivas kiel aristokrata, maljuna sinjoro.

Al tiu leono similas granda, siberia tigo, kiu en la somero de la jaro 1893 venis el Vladivostok al la bestĝardeno en Hamburgo, kaj kiun mi poste posedis. Tiu ĉi tigo estis vere tiel malsovaĝa kiel dombesto. Mi povis fari kun ĝi, kion ajn mi volis. Bone ĝi povus restadi en familia ĉambro. Krome, ĝi estis belega kaj ĉar mi malfacile disiĝis de ĝi, ĝi restis pli ol jaro ĉe mi. Poste mi aŭdis el bona fonto, ke oni kaptis la beston tre juna kaj ke libere ĝi iris pli ol jaro, ne farante malbonon. Ĉiun matenon mi vizitis ĝin kiam mi rondiris; mi karesis ĝin kaj gaje ĝi saltis ĉirkaŭ min. Kaj kiam okaze mi preteriris ĝian kaĝon ĝi miaŭe alvokis min por sciigi, ke mi ankoraŭ ne salutis ĝin.

El: Pri bestoj kaj homoj.

KARL HAGENBEK.

LA TILIO.

Malrapide.

1-A 5 | 1 1 1 2 | 7 . 6 5 1 | 7 . 5 6 6

I. Pro ki-o staras do tili', Ho ve, en la ĝar-

0 | 0 0 0 5 | 2 2 2 3 | 2 . 2 1 4

I. Pro ki-o staras do ti-li', Ho

5 . 0 5 | 1 1 5 4 | 3 . 2 .

den' ? Ĝi volas min kon - so - - - li,

3 . 1 2 2 | 3 . 0 5 | 1 1 5 4

ve, en la ĝar-den? Ĝi vo-las min kon-

1 2 3 2 1 7 6 | 7 . 6 5 5 | 6 7 1 2

so - - - - - li. Ĉar perdis mi la
(3) kon - so - - le pre-

3 . . 4 | 5 . . 0 | 0 5 6 7

so - - - - - li, Ĉar per-dis
(3) Kon - so - -

Mi vidas en ĉiu homa nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ ĝia persona valoro kaj agoj.

Zamenhof.

a-matin', ĉar perdis mi la a — ma — tin'.
zen-tis flor'.

mi la a - matin', ĉar perdis mi la a-matin'.
le pre - zentis flor'.

En ĝardeneto vagis mi,
La dormo kaptis min;
La sonĝo estis dolĉa,
Balzam' bonfara por l'anim'.
Antverpeno (Belg).

Kaj kiam mi vekiĝis,
La sonĝo estis for;
Sed al mi odoron sian
Konsole prezentis flor'.
Trad. J. VAN SCHOOR.

LA BOVINO.

Maria estis vidvino kaj loĝis kune kun sia patrino kaj ses infanoj. Ili posedis nur malmulton por vivteni sin. Sed ili elspezis sian monon por aĉeti ruĝan bovinon kaj tiel ili havis ĉiam lakton por la infanoj. La plej aĝaj infanoj paŝtis la bovinon sur la herbejoj kaj donis al ĝi fluidan nutraĵon.

Foje, kiam la patrino estis for de la hejmo, la plej aĝa filo, Menno, rompis glason. Li timis, ke la patrino riproĉos. Tial li prenis la grandajn vitropecojn, portis ilin eksteren kaj enfosis ilin en la sterkamaso, sed la malgrandajn pecetojn li ĵetis en la trogon de la bovino. La patrino ne trovis la glason kaj pridemandis ilin; sed neniu sciis ion. Menno diris nenion, do restis tiel.

La sekvintaĵ tagon post la manĝo, alportante manĝaĵon al Ruĝboveto, la patrino vidis, ke ĝi ne bonfartas kaj ne volas manĝi. Ŝi provis trinkigi la bovinon kaj ŝi venigis iun, kiu estis kompetenta pri bestmalsanoj. Tiu diris, ke la bovino mortos, kaj ke plej bone ŝi buĉigu la beston kaj vendu la viandon.

Kiam la bovino estis buĉita, ili trovis en ĝia gorĝo vitropeceton. Nun ili sciis la kaŭzon de ĝia morto.

Menno aŭdis ĉi tion kaj ekploris. Li konfesis al la patrino, ke li rompis la glason. La patrino same ĉagrenis kaj diris: „Ni mem

mortigis nian bovinon, kaj ni ne havas monon por aĉeti alian. Kiel vivos miaj etuloj sen lakto?"

Menno ĉiam pli ege ploris kaj ne volis manĝi de la bovaĵo. Ĉiam kiam li ekdormis, li vidis en siaj sonĝoj, kiel onklo Vazilo kondukas al ili Ruĝbovineton kun ĝiaj grandaj velurnigraj okuloj kaj ĝia belega, ruĝa nuko.

La infanoj ne plu povis trinki lakton. Nur je festotagoj ili ricevis ĝin, ĉar tiam Maria aĉetis iom de la najbarino.

Okazis, ke la sinjorino de la bieno bezonis virinon por gardi ŝiajn infanojn. Kaj la avino diris al sia filino: „Lasu min iri; mi petos la sinjorinon dungi min kaj eble la bona Dio zorgos, ke vi kun la infanoj povos malhavi min. Kaj mi ŝparos en unu jaro sufiĉe por aĉeti bovinon.”

Dirite, tuj farite. La avino enloĝis ĉe la sinjorino; sed Maria kaj la infanoj vivis eĉ pli malbone ol antaŭe. La infanoj estis dum tuta jaro sen lakto. Malbonan kaj malmultan nutraĵon ili ricevis, kaj ili fariĝis malgrasaj kaj palaj. Sed kiam la jaro estis pasinta, la avino revenis kaj alportis dudek rublojn.

„Nu, filinjo,” ŝi diris, „nun ni aĉetos bovinon.”

Maria tre ĝojis kaj ankaŭ ĉiuj infanoj. Maria kaj la avino iris kune al la foiro por aĉeti bovinon. Ili petis najbarinon gardi la infanojn kaj najbaron kuniri por elekti bovinon.

Post la tagmezo la infanoj ĉiumomente iris sur la vojon por rigardi. Ili pasigis la tempon divenante, de kiu speco la bovino estos, nigra aŭ ruĝa. Ili rakontis unu al la alia, kiel ili nutros ĝin. Dum la tuta tago ili atendis, kaj la atendado daŭris tiom longe!

Ili iris renkonte al la bovino unu kilometron, sed ĉar jam mal-lumiĝis, ili reiris.

Subite ili vidis alveni veturilon. La avino sidis en ĝi, mikskolora bovino estis ligita al ĝi kaj la patrino iris post ĝi instigante la bovinon per branĉo.

La infanoj kuris renkonte kaj de ĉiuj flankoj rigardis la beston. Ili alportis panon kaj herbon kaj tuj volis nutri ĝin. La patrino eniris la dometon, formetis la dimanĉajn, kaj surmetis la labor-vestojn, iris eksteren kun laktositelo kaj lavtuko. Ŝi eksidis apud la bovino kaj purigis per la lavtuko la mamon. Feliĉe, la bovino donis lakton. Kaj la infanoj staris ĉirkaŭe kaj vidis, kiel la lakto ŝprucas en la sitelon kaj ili aŭdis la susuradon inter la fingroj de la patrino. Kiam la sitelo estis duonplena, la patrino ĝin portis en la kelon kaj vespere ĉiuj infanoj ricevis plenan glason da ĝi.

TEO TOLSTOI.

LA REVENO DE LA ARTISTO.

Un tagon en Oktobro en la jaro 1494 staris granda aro da scivoluloj, senokupuloj kaj fremduloj antaŭ kolono de la urbdomo en Neŭrenbergo, kiu tute estis kovrita de granda aŝiŝo. Sur ĝi oni povis legi jenan sciigon: „Jozef Dürer, oraĵisto en ĉi tiu urbo, komunikas al siaj samurbanoj, ke li ĉivesperon en sia butikio forvendos ĉiujn siajn oraĵojn. La listo de la vendotaj objektoj estas tro longa por publikigo. La elvendo komenciĝos je la kvara posttagmeze.”

„Kion?” kriis tre emociite unu el la ĉeestantoj, kiu estis laŭ la beleco kaj la fasono de siaj vestoj riĉa fremdulo. „Kion? La riĉa oraĵisto Dürer aŭkcie vendos la plej belajn produktojn de sia nobla arto? Kia malprospero devigas lin al ĉi tiu malĝoja afero?”

„Verŝajne vi ne scias,” respondis manlaboristo al li, „ke Jozef Dürer oferis multon, por savi la firmon de sia bofilo, kiu estis ĝis antaŭ nelonge unu el la plej riĉaj komercistoj de Lubek. Tiu bofilo forkuris kaj postlasis multajn ŝuldojn. Por nuligi ĉi tiujn ŝuldojn kaj redoni al siaj genepoj honestan nomon, la grizulo senigas sin de la multvaloraĵoj, kiuj formas la ĝojon kaj la fieron de lia maljunaĝo. Ah, liaj haroj griziĝis antaŭtempe pro multe da ĉagrenoj.”

„Kion vi celas per tiuj lastaj vortoj, amiko?” demandis la fremdulo. „Ĉu vi povas ion pli detalan diri pri tio?”

„Volonte mi rakontos al vi, kio ne estas sekreto por la tuta Neŭrenbergo. Jozef Dürer havis tri filojn kaj unu filinon. Ĉi lasta riĉe edziniĝis: ŝi fariĝis la edzino de la Lubeka komercisto. La du pli aĝaj filoj ricevis per gravaj monoferoj kaj multe da penado aristokratajn oficojn, unu ĉe la kortego de la princo de Bavario, la alia ĉe la kortego de la duko de Wejmar. Pro siaj prospero kaj brila kariero ili forgesis la maljunan patron, kies nenobelan nomon ili eĉ ŝanĝis kontraŭ pompa nobela titolo.”

„Kaj la tria filo?”

„Albreĥt — estis lia nomo — volis fariĝi artisto, sed Jozef forte kontraŭstaris tiun deziron. „Vi fariĝu oraĵisto, same kiel mi,” li respondis al la junulo, kiam ĉi tiu lin petis pri peniko, paletro kaj tolo, „kaj, se ne, vi foriru el mia hejmo. Vi do elektu.”

„Kaj kiel finiĝis?” demandis la nekonato.

„Lun tagon Albreĥt estis for; tio okazis jam antaŭ pluraj jaroj kaj poste oni ne plu aŭdis ion pri li. Ĉu li vivas, ĉu li mortis, ĉu eble li iris en la armeon — neniuj povas informi pri tio.”

En la sama momento sonis la kvara kaj la butikoj de la oraĵisto estis malfermata. Aro da scivoluloj, kompetentuloj kaj amatoroj en-
trudis sin.

La aŭkciistoj komencis la laboron. Krom teleroj, pladoj, potoj, vazoj, ornamaĵoj el arĝento kaj oro, amaso da juveloj kaj mult-valoraj estis unue vendata. Poste la vico venis al la gravaj majstrolaboroj de la oraĵisto, ĉiuj prilaboritaj per la plej granda artiste-
teco. Tie oni vidis en sia nesuperebla perfekteco cizelitajn kalikojn, reliefojn laŭ la antikvuloj kaj laŭ bibliaj temoj, statuojn kaj multekostajn juvelaĵojn. Tiom longe kiom oni vendis la ordinarajn objektojn, la griza oraĵisto sidis indiferenta en angulo de la butikoj. Sed, kiam la aŭkciisto komencis unutone rekomendi la majstrolaborojn, la laborojn per kiuj li akiris sian faman nomon, la maljunulo ne plu povis regi sin. Ekscitite li saltis de sia seĝo, kaj kvazaŭ pelata de nevidebla potenco, li ĉirkaŭiris siajn trezorojn, kiel patrino la lulilon de malsana infano.

„Ses statuojn el oro, laŭ la antikvuloj,” nun eksonis.

„Mil dukatojn!” diris iu voĉo.

„Dekmil!” kriis alia.

„Kvindek mil!” diris la unua.

Neniu riskis pli proponi kaj la statuoj estis por la unua. La maljuna oraĵisto apenaŭ spiris. Lia vizaĝo palis kiel de kadavro; konvulsia tremado tute skuis lian korpon. Tamen li staris rekte apud la oficistoj, kiuj notis la elspezitajn sumojn. Kiam ĉio estis vendita, la grizulo malĝoje ĉirkaŭrigardis; ĝemo venis trans liaj lipoj kaj larmo falis nerimarkite en la blankan barbon.

La plej ĉagrena momento venis, kiam ĉiuj karaj objektoj por ĉiam estis forportotaj el la hejmo.

„La nomoj de la aĉetintoj de la lastaj dudek tri numeroj estas ankoraŭ ne donitaj,” diris la skribisto.

„Estas nur unu aĉetinto!” respondis la aŭkciisto.

„Petu lin veni ĉi tien, por doni sian nomon kaj pagi siajn aĉetojn.”

Viro tridek kvar- aŭ kvin jara kun simpatia, afabla vizaĝo venis al la tablo. La noblan frunton enkadris longaj, blondaj bukloj, kiuj kuniĝis kun la krispa, densa barbo. Alta hispana ĉapelo kun

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.

*ĉi ti = finkubas
li = ĉirkaŭ
reĝojgen*

ni = Schmidt

lypht

longa, krispa plumo ombris lian vizaĝon. Liaj vestoj estis multekostaj kaj lastmodaj; ĉirkaŭ lia kolo pendis, duonkaŝite de la felborderita mantelo, peza, ora ĉeno kun la bildo de la imperiestro Maksmiliano de Germanio.

„Jen la mono!” li diris mallaŭte kaj per malfirma voĉo. „Bonvolu kontroli ĝin.”

La skribisto obeis kaj trovis ĉion bonorda. Tial li diris: „Kaj via nomo, estimata sinjoro? Mi devas skribi ĝin en la protokolon.

„Skribu do,” hezite respondis la nekonato, „skribu do: Albreĥt Dürer.”

Je ĉi tiuj vortoj la maljuna Jozef eksaltis, senparole rigardis la junan viron kaj fine li falis al li ĉirkaŭ la kolon, ekkriante: „Albreĥt..... mia bona Albreĥt..... Ĉu estas vi, vere, kiun mi ĉirkaŭbrakas? Ho, mia filo, firme mi volas teni vin kaj neniam plu mi lasos vin foriri de mi! Vi do ne forgesis vian maljunan patron, vi do ne plu koleras kontraŭ mi?”

„Mi kolerus kontraŭ vi?” demandis la filo, profunde emociite, „mi petu al vi pardonon, ĉar mi malobeis vin!”

„Mia filo,” diris la oraĵisto, premante la retroviton al sia brusto. „Ni forgesu kaj pardonu ĉion inter ni, ĉu bone tiel?”

„Junaj homoj ofte eraras, elektante profesion,” diris la filo serioze. „Via severeco kontraŭ mi bazis sur la saĝa principo, ke bona metiisto pli valoras ol mezbona artisto. Vi pravis en tio, patro! Sed konfesu, ke ankaŭ mi iomete pravis,” li modeste daŭrigis. „Imperiestro Maksmiliano nomis min sia ĉefpentristo kaj la reĝo de Francio, Ludoviko XII, vokis min al Parizo, por persone kontroli la faradon de kelkaj gravaj konstruaĵoj!”

La homamaso entuziasme aplaŭdis al Albreĥt Dürer, la Neŭrenbergano, kies nomo baldaŭ tra tuta Germanio sonis kún rajta fiero, dum oni interpretiĝis por gratuli la patron kaj la filon.

„Jes,” ĝojkriis la grizulo, dum li kisis sian filon sur la frunto, „estu benata, mia filo, ĉar hodiaŭ vi pruvis, ke la genia kaj nobla homo en vi kuniĝas.”

ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „Jar-kolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

ENIGMOJ.

1 2

a, a, a, a, b, i,
 k, k, n, n, o, o,
 o, o, p, p.
 La vortoj signi-
 fas, horizontale
 kaj vertikale: 1.
 muzikinstru-
 menton; 2. in-
 fanon.

Riga, Latvolando.

1 2

c, c, g, g, i, k,
 k, l, n, n, o, o,
 o, o, o, o.
 La vortoj signi-
 fas, horizontale
 kaj vertikale: 1.
 birdon; 2. pa-
 rencon.

B. REICHBERG.

LA SOLVOJ EL NO. 12.




aNgilo
 clprEs
 IEteRo
 aSerTi
 sTarAs
 sUpujo

Premion gajnis:
 F.ino Lebrun,
 Toulouse (Fre);
 S.ro d'Orsay,
 Bruxelles (Blg);
 S.ro Deken, Am-
 sterdam (Ned).

Premion pro verkaĵo gajnis ĉifoje: F.ino Russmayr, Strasswalchen (Aŭstr.),
 F.ino Thompson, Birmingham (Angl), S.ro Stankŭs, Poruba u Orlové (Ĉeh),
 kaj F.ino G. v. Ammers, West-Grafdijk (Ned.).

Al tiuj abonantoj, kiuj ankoraŭ ne pagis la abonkoton por la
 jaro Julio '36—'37, ni afable petas, ke ili baldaŭ faru tion. Al la
 nederlandaj abonantoj ni sendos kvitancojn post 1 Septembro. La
 eksterlandaj abonantoj pagu al la peranto en sia lando (vidu pa-
 ĝon 40) aŭ rekte al ni per mandato, aŭ poŝtaj respondkuponoj.



Estis afabla farmisto, ĉe kiu ni tranoktis!
Jes, sed kia vendisto!!

Faru verkaĵon laŭ la supra bildo, kaj sendu ĝin antaŭ 1 Oktobro al: Red. „La Juna Vivo”, West-Graafthijk. Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni dislotos du premiojn.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

Jarlibro de la Esperanto-Movado, 1936. — Eldonis Universala Esp. Asocio, Genevo-Londono. Senpaga por Aktivaj Membroj de U.E.A. 189 p. broŝ. „Normigo”. — Mikaelo Gitterman, 16 p. Eldonis „Ekrelo”. Presis Mospoligraf II, Ribinskaja 3, Moskvo 2.

Glumarkoj pri Vire kun Esperanta teksto. Kontraŭ unu respondkupono oni ricevas unu folion da glumarkoj. S.ro A. Legret, 26, Cité des Capucins, Vire (Calvadas), Francujo.

„Kiel lerni Esperanton” — Leo Belmont. Form. 15 × 21 cm., 20 paĝa. Prezo zl. 0.30. Eld. „Lingvo Internacia” en Varsovio.

„Kaptitaj en Nubio” — el „Durch die Wüste” de Henryk Sienkiewicz. Esperantigita de Frato Wigbertus v. Zon. L.K., kaj kontrolitaj de la Akademio. Eld. Jos. M. Krynen, Vught, Nederlando. Prezo (afrankite): broŝ. 1,00 gld., bind.: 1,50 gld.

Por komencantoj.

STELO DE NIA ESPERO.

Ĉie sur nia tero	Via radia beno
Nur malpaco sen fin'	Turnu la nubojn for,
Kun ĉagrena sufero, —	Signo de l'homa kompreno,
Stelo de nia espero,	Pacon de stela sereno
Helpu forigi ĝin.	Donu de koro al kor'.

Iĝu la revo vero,
Ke oni sekvu vin
Ĉie sur nia tero!
Stelo de nia espero,
Lumu kaj gvidu nin!

Berlino (Germ.)

KARL VANSELOW.

TUNGUSOJ (Norda popolo).

Oni multe rakontas pri Tungusoj. Tunguso estas la plej vigla kaj tolerema ĉasisto. Sur skioj en nura surtuto li dum tutaj semajnoj foriras al la tajgo (siberia arbarego) kaj tie ĉie por li estas domo. Kiel li ĉasadas? Jen li mortigis kapron, pendigis la viandon sur arbo kaj ĉi loko fariĝis lia hejmo, sed mem li foriris por akiri felojn. Li mortpafis multajn sciurojn kaj reiris al la arbo laŭ fremdaj piedsignoj. Okazis ke estis iu homo, kiu manĝis lian viandon. La Tunguso ekvidis tion kaj diris al si: „Estis bona homo”. La ĉasisto apud-pendigis la sciurojn, iom manĝetis, ripozis, kaj foriris por akiri zibelojn, kaj kiam li revenis estis alia homo, li manĝis la viandon, prenis iom de la sciuraj feletoj. La Tunguso diris: „Estis malriĉa homo.” Kaj la trian fojon iu nova gasto forportis ĉiujn sciurojn, sed la viandon li ne tuŝis. Tiam fine la ĉasisto diris: „Estis malbona homo. Ne malbona tial, ke li prenis la sciurojn, sed tial, ke li estante sata prenis ilin.

Siberio (Trad. M. P.)

PRIŜKIN.

Pro la ferio ni aperigis duoblan numeron. Estonte la revuo regule aperos en la komenco de ĉiu monato.

TAMEN BONE.

Mozes Mendelssohn estis germana scienculo, kiu verkis multajn bonajn librojn. Li estis tamen malriĉa. Dum kelka tempo li estis komizo ĉe iu komercisto, kiu ne elpensis la pulvon.

Foje vizitis lin eminentuloj kaj scienculoj honoris lin per sia amikeco, ĉar ili estimis lian grandan saĝon. Ĝuste li penadis super enuiga adicio en la kaslibro.

„Estas domaĝe, mia bona Mozes,” diris la nobla sinjoro, „kaj estas nepardoneble, ke saĝa homo, kia vi estas, devas servi al viro, kiu ne indas al vi doni glason da akvo. Via etfingro pli valoras ol lia tuta kolosa korpo.”

Kviete Mendelssohn respondis: „Tamen estas bone, kiel nun estas. Ĉar nun mia mastro povas multe profiti de mi. Se mi estus la mastro kaj li mia komizo, kion do li povus fari por mi?”

LA SAĜAJ FORMIKOJ.

Benjamin Franklin sidis foje antaŭ la matenmanĝo. Sur la tablo staris pladeto kun sukerpecoj. Li rimarkis, ke certe dudek nigraj formikoj sin bone regalas. Li forpelis ilin, sed ili revenis. Denove li forpelis ilin, sed eĉ pli rapide ili revenis.

Franklin volonte ion lernis kaj tial li ekpensis elprovi la prudenton de la formikoj. Li prenis ŝnuron kaj ligis ĝin al la plafono; ĉe la fino li fiksas la pladeton tiel, ke ĝi libere pendis super la tablo.

La formikoj vidis la pladeton, sed ne estis eble atingi ĝin. Ili provis atingi ĝin, grimpante unu sur la alian. Sed ĉiam ili malsuprenglitis kaj finfine ili ĉesis la klopodojn.

Franklin pensis, ke ili nun rezignis pri la sukero. Sed la formikoj havis pli da prudento ol Franklin supozis. Vidante, ke ili de la tablo ne povas atingi la pladeton, ili efektivigis alian planon. Ili kuris laŭ la tablopiedo al la planko, trans la planko al la muro; laŭ la muro supren, laŭ la plafono al la ŝnuro; kaj laŭ la ŝnuro malsupren en la pladeton.

Lernu bone la novajn vortojn. — Traduku en vian gepatran lingvon: „Tungusoj”, „Tamen bone” kaj „La saĝaj formikoj”. — Rakontu la enhavon de la historietoj per propraj vortoj. — Lernu parkere „Stelo de nia Espero” kaj deklamu ĝin en via esp. rondo. — Ekzercu la ludon pri la proverboj.

LUDO.

Unu ludanto eliras la ĉambron. La aliaj elektas proverbon. Ĉiu ricevas vorton de la proverbo. Ili ekz. elektas: „Barelo malplena sonas plej laŭte.” Unu do ricevas la vorton: „barelo”, alia: „malplena”, la tria: „sonas”, ktp.

La *) **elirinto** revenas kaj nombras: „Unu, du, tri!” Je „tri” ĉiu diru la vorton, kiun li ricevis. Malgraŭ la granda bruo la ludanto penas kapti kelkajn vortojn por diveni la proverbon.

Li nombras tiom ofte „unu, du, tri,” ĝis kiam li divenas la proverbon. Tiam alia persono eliras la ĉambron.

*) Kiu skribas estas skribanto. Kiu skribis estas skribinto.
Kiu eliras estas eliranto. Kiu eliris estas elirinto.

LA DEK TRIA LECIONO.

A.	Mi labor- is	Hieraŭ mi labor is	Hieraŭ ni lud is .
	Mi labor- as	Hodiaŭ mi labor as	Hodiaŭ ni lud as .
	Mi labor- os	Morgaŭ mi labor os	Morgaŭ ni lud os .

B. Kun- aŭ sen injekto.

Viro, kiu ege **suferas pro** dentdoloro, aperas ĉe dentisto. „Ĉu mi donu al vi **injekton**?” estas la unua demando de la dentisto. La viro **kap-jesas**: „Mi **petas**”. La dentisto injektas lin kaj diras: „Nu, **atendu momenton** en la atendejo, poste mi eltiros la denton”. — Li tre **miras**, kiam li post **kelka** tempo **rimarkas**, ke la **paciento**, Blomers, estas for.

Je la sama **vespero** li **renkontas** dentiston, kaj tiu diras: „Mi **spertis** hodiaŭ strangan **aferon**! Imagu, venas al mi viro, kaj petas, ĉu mi povas eltiri lian denton. Mi demandas al li, ĉu li deziras injekton, tio **kostas** dek frankojn. „Ne”, li diras, „tiru nur!” — Mi eltiras la denton, kaj la viro eĉ ne krietas! Li **sentis nenion**!!!”

La unua dentisto demandas **iom maltrankvile**: „Ĉu vi **eble** scias la nomon de la viro?”

„Jes,” estas la respondo, „lia nomo estis Blomers!”

Tiel Blomers **ŝparis** dek frankojn!

Parizo (Franc.)

LECHELLE.

Kopiu A kaj B. en vian kajeron. — Lernu bone la novajn vortojn en A kaj B. — Traduku A kaj B en vian gepatran lingvon. — Legu kelkfoje la rakonton „Kun aŭ sen injekto” kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj. — Repondu al jenaj demandoj:

Pro kio suferis la viro? Al kiu li iris? Kion demandis la dentisto? Kion respondis la viro? Kion faris la dentisto? Kion li diris? Kien iris la viro? Kio estis la nomo de la paciento? Kial miris la dentisto? Kio okazis dum la vespero? Kion rakontis la dua dentisto? Kiu venis al la dua dentisto? Kion petis la viro? Ĉu la paciento deziris injekton? Kion li diris? Ĉu la dentisto eltiris la denton? Ĉu la viro kriis? Ĉu li sentis ion? Kion demandis la unua dentisto al la dua? Kion respondis la dua? Kion ŝparis Blomers?

Uzu en frazoj: Al la urbo, antaŭ la fenestro, apud la domo, de la patro, ĉirkaŭ la tablo, el la ĉambro, en la mano, tra la mondo, kontraŭ la domo, kun la patrino, por la onklo, pri la libro, sen mono, super la tegmento, sur la benko, sub la divano.

LA DEK KVARA LECIONO.

A. Riĉa — riĉ-ulo, bona — bon-ulo, timi — tim-ulo, kun — kun-ulo, laboro — labor-ulo, diligentulo, sanulo, malsanulino, kontraŭ-ulo, fortulo, fremdulo, belulino, dikulo, grandegulo, malsaĝulo, longulo, malliberulo, senlaborulo, **strangulo**, **mutulo**, **surdulo**, grizulo, karulino.

B. Sukero — suker-**aĵo**, fero — fer-aĵo, paki — pak-aĵo, labori — laboraĵo, porko — pork-aĵo, bovaĵo, bonaĵo, belaĵo, lignaĵo, posedaĵo, fruktaĵo, mangaaĵo, trinkaĵo, skribaĵo, pentraĵo, dolĉaĵo, kreskaĵo, frandaĵo.

C. Jonjo kaj Joĉjo.

Iam estis **edzo** kaj edzino. La nomo de la edzo estis Joĉjo, kaj la nomo de la edzino estis Jonjo. Ambaŭ homoj **ĉiam** manĝis el unu poto. Tiu poto povis enhavi **sufiĉan** manĝaĵon por la du homoj. Sed ili estis tro maldiligentaj por lavi la poton. Ĉiam ili for-**metis** la malpuran poteton. **Ofte** restis en ĝi malpura tavolo. Kaj tiu **tavolo** ĉiam **kreskis**. **Fine** la poto **ne plu povis** enhavi sufiĉan manĝaĵon por Jonjo kaj Joĉjo.

„Unu el ni devas lavi la poton.” diris Joĉjo. „Jes, sed kiu?” diris Jonjo. „Vi!” respondis Joĉjo. — „Ne, vi!” diris Jonjo. Kaj nun ili komencis **kvereli**. Ĉar ambaŭ estis tro maldiligentaj por lavi la poton. Fine Joĉjo havis **ideon**. „Mi scias! Ni nun iras dormi, kaj kiu el ni **morgaŭ** diros la unuan vorton, tiu devas lavi la poton!”

„Bone!” diris Jonjo. Kaj ambaŭ enlitiĝis.


Je la **sekva** mateno **neniu** el ili ellitiĝis. Ili **daŭre** dormis. Kaj je la dekdua (horo) ili ankoraŭ kuŝis en la lito. La najbaroj vidis tion, kaj pensis: Jonjo kaj Joĉjo **certe** estas malsanaj. Ili **avertis** la **policon**. Du policistoj venis. Ili **perforte** malfermis la pordon kaj eniris la ĉambron. Tie ili vidis la maldiligentulojn sur la lito. Ili ne dormis kaj bone vidis la policistojn, sed ili diris **eĉ** ne unu vorton, ĉar neniu el ili ŝatis lavi la poton. La policistoj iris al la lito. „Kio estas al vi?” demandis unu al Joĉjo. Joĉjo ne respondis. „Ĉu vi estas malsana?” demandis la alia al Jonjo. Ankaŭ ŝi ne respondis. Tiam unu el la policistoj prenis la kovrilon de la lito kaj ĵetis ĝin al seĝo. Sed nun Jonjo estis kolera! „**Lasu** tion!” ŝi kriis. „**Ĝi** ja ne estas via!” — „Ha, vi devas lavi la poton!” **kriis** Joĉjo, kaj li **saltis** el la lito. „Ĉar vi diris la unuan vorton!”

Tiam la policistoj komprenis, **kial** ili **tiom** longe **silentis**. Ili **preskaŭ falis pro plezuro!**

- I. Kopiu A, B, C en vian kajeron.
- II. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C.
- III. Traduku A, B, C en vian gepatran lingvon.
- IV. Respondu al jenaj demandoj:

Kio estas la nomoj de la edzo kaj de la edzino? El kio manĝis la homoj? Ĉu la poto povis enhavi sufiĉan manĝaĵon? Kiaj estis la homoj? Kio restis en la poto? Ĉu la tavolo kreskis? Ĉu tiam la poto povis enhavi sufiĉan manĝaĵon por Jonjo kaj Joĉjo? Kion diris

fine Joĉjo? Ĉu ili je la sekva mateno frue ellitiĝis? Kion pensis la najbaroj? Kiuj avertis la policon? Kiuj malfermis la pordon? Kion



ili vidis? Kion demandis la policisto al Joĉjo? Ĉu Joĉjo respondis? Kion li demandis al Jonjo? Ĉu Jonjo respondis? Kion faris la policisto? Kia estis Jonjo? Kion ŝi kriis? Kion diris Joĉjo? Kion li faris? Kiu preskaŭ falis pro ĝojo?

El: „Zonneschijn” (4de stukje), C. A. J. v. Dishoeck, N.V. Bussum.

LUDO.

(Bona ekzerco por ripeti la „ki”-vortojn)

Unu forlasas la ĉambron. La aliaj elektas objekton, ekz.: „lam-po”. La persono, kiu eliris, revenas kaj demandas: „Kie ĝi estas? De kiu ĝi estas? Kia ĝi estas? Kial ĝi estas?” La aliaj respondas laŭvice. La ludo finiĝas, kiam li divenis la objekton. Tiam alia forlasas la ĉambron.

Kion diras P. Balkányi, unu el la plej eminentaj hungaraj Esperantistoj, pri la unua jarkolekto de „La Juna Vivo“:

„Lingvo Libro” (No. 1 '36): „..... Kun karesa mano mi prenas tiun ĉi simplan libron por ĝin prezenti al vi: Oni povas ĝoji, ke aperas tia gazeto por junularo, precipe inter 12-16 jaroj. Oni jam kelkfoje provis eldoni tian junularan gazeton, sed eble neniu plenumis tiel bone kaj regule sian devon. La kunligita jarkolekto de Julio '34 ĝis majo '35 estas valora, kaj ĉiam aktuala libro, tiel por komencantoj, kiel por progresantoj: taŭga ankaŭ por plenaĝuloj, por grupoj, kunvenoj. Oni trovas en ili 20 lecionojn de la gramatiko kun bildoj iom laŭ la metodoj modernaj, interesajn kaj vere taŭgajn; krome mallongaj kaj longaj historioj, rakontoj, anekdotoj, ŝercoj, enigmoj, infan- kaj societludoj kaj kantetoj kun muziknotoj abundas, kolektitaj el diversaj landoj, sed precipe el Nederlando. Certe kelkaj rakontoj kaj bildoj estas prenita el similaj nederlandaj eldonoj. La lasta kajero estas tute dediĉita al la mondpaco. Nur anoncetoj de korespondemuloj multe mankas. La lingvo kaj stilo — konsidere ke temas pri gazeto — estas laŭdinde bonaj. Mi trovis nur malmultajn neplaĉaĵojn. Tamen tiuj eraretoj nenion forprenas el la taŭgeco de la libro. Ekzemple verketoj de Berta v. Suttner, Lagerlöf, Peter Rosegger, kanteto el Riga: „Junularo formu rondon” (senriproĉa teksto) montras la valoran enhavon. Laŭ la surpriso kelkaj numeroj aperis en 5000 ekzempleroj. Mi deziras dekolbligon, pli multan kontakton kun la junularo el diversaj landoj kaj por tia konstante uzebla verko nepre necesan — enhavliston! Espereble ĉio realiĝos kaj nia movado floros tie, kie ĝi precipe devus: ĉe la junularo!

P. B.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „L. J. V.”: Aalborg (Dan); Brünn (Ĉeĥosl.), dua jaro; Janów k. Katowice (Pol.), Somain (Franc).
2. Aperis artikoloj el „La Juna Vivo” en jenaj gazetoj: Svenska Esperanto Tidningen: „Tri Knabinetoj” (La Juna Vivo” No. 6-29), „Reklamo” (L.J.V. No. 1-'36). A Uniao (Portugala gazeto): „Estas Vilhelmo” (L.J.V. No. 8).
3. Ĉe la konferenco de la Londona Esperanto-Federacio la Laborista Esp. Asocio ludis „La Novaj Vestoj de la Reĝo” (el „L.J.V.” No. 6-29). La granda sukceso, kiun oni ĝuis, montras ke la teatraĵeto tre taŭgas ankaŭ por plenaĝuloj.

La Redakcio de „La Juna Vivo” atentigas la infangrupojn, kiuj deziras prezenti „La Novaj Vestoj de la Reĝo”, ke ĝi pretas pruntedoni ĉiujn kostumojn, teksilon, monkeston ktp.

ATENTU!!!

Nova peranto en **Ĉinujo** estas: Ĉina Esp.-Librejo, No. 14, lane 169, Carter Road, Ŝanhajo.

Nova peranto en **Japanujo**: Japana Esp.-Instituto, Tokio, Hongo-Motomaĉi. Poŝtĉekkonto: Tokio 11325.

Svisujo: La nova ĝironumero de S.ro Dasen estas: I. 6256.

KORESPONDADRESOJ.

Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj (por ĉiu plia linio oni aldonu 0,30 gld.)

Danujo: S.ro Schiött, Vaenget 7, Kalundborg, deziras korespondi kun eksterŭropaj fervojistoj. Certa respondo.

Ĉeĥoslovakujo: S.ro O. Hoffmann, Fakinstruisto, Otrokovice, dez. kor., interŝanĝi poŝtm., poŝtk., gazetojn, ktp. Certe respondos.

Hispanujo: Junulo hispana deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Adr: Gregorio Iranzo, str. Garcio Berlanga, Valencia.

Hispanujo: Josef Marti, Roses (Gerona) deziras korespondi kun gekdoj el ĉ.l., pri ĉ.t., interŝ. let., poŝtk. il., poŝtm., gaz. Certa resp.

Hispanujo: S.ro José Ferrer, Calle Vallmitjana I, Barcelona, dez. kor.

Japanujo: S.ro S. Katsuno, Simosinkai, Hitotaumätsu-muza, Chosei-gun, Chiba-ken, dez. kor. kun Eŭropo pri div. tem. Li estas 22-jara junulo.

Nederlando: Dez. kor. pri svebflugsporto kaj aviatiko, interŝanĝi fotografajojn ktp.: Jacq C. v. d. Elzen, Berkel Enschof, A 58.

Nederlando: 7 Geknaboj, 11-16 jaraj, dez. kor. kaj interŝ. poŝtmarkojn k. ĉiuj landoj. Certa resp. Skribu al: S.ro M. Muilwijk, B270, Slikkerveer.

Nederlando: 21 jara junulo dez. kor. k.ĉ.l., speciale pri birdoj kaj kreskajoj. Certe respondos. J. Kars, Meent 15, Leerdam.

Nederlando: Miaj gelernantoj (18-25 jaraj) dez. kor. kun ĉ.l., pri ĉ.t. Bonv. skribi al: F.ino Wittop Koning, Frans v. Mierisstr. 121, Amsterdam.

Nederlando: S.ro J. P. Verheul, Gaffelstr. 48a, Rotterdam, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtk. il. kun ĉiuj landoj.

Portugalujo: 24-jara fraŭlo dez. interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn. Adr: José Antonio Salgueiro dos Santos, Aljustrel, Alentejo.

Nederlando: Kiu al mi sendas kvanton da p.m. 50, 100 aŭ 150, tuj ricevos la saman kvanton. Fraŭlo 19 jara. Fr. Hautus, Neer (L).

Nederlando: S.ro T. Aaldertsz, Tuinstr. 1, Wormerveer, dez. kor. kun gemikoj, precipe anglaj.

Finnlando: S.ro Eelis Peltonen, Petäjärvi, Ryhmä, dez. korespondi.

Finnlando: S.ro Niilo Arpomaa, Petäjärvi, Ryhmä, dez. korespondi.

Portugalujo: 25 jara fraŭlino dez. kor. kun gesamideanoj de ĉie. F.ino Margarida Pereira Duarte, str. da Misericordia 37, Ponta Delgada, Acores.

Argentino: 48 jara radio-inĝ. deziras korespondadon por nova hispanlingva revuo „Internacia” — H. Ceretti, 9 de Julio 3301 — Rosario.

ANONCETOJ. (30 c. por ĉiu linio).

INFANHOTELO „LA ESPERO”, Wouwermanstr. 30, Amsterdam, Nederlando. Ĉiu sana, eksterlanda Esperantist(in)eto (ne pli aĝa ol 12 jaroj) povas dum unu semajno senpage loĝi, manĝi, trinki kaj sin amuzi en ĉi tiu unuaranga infanhotelo.

LA DUA JARKOLEKTO DE „LA JUNA VIVO”, bindita en bela kovrilo, estas mendebla ĉe la redakcio. Prezo 0,80 guld., por abonantoj 0,65 guld.

REKLAMTARIFO:

1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅙ paĝo: 2,5 gld.

NE FORGESU

ke la unua bindita jarkolekto
de

„LA JUNA VIVO”

estas la plej valora kaj malkara

INSTRUULO.

Gi vekas la intereson de

lernantoj kaj progresintoj!

Mendu tuj!!

Prezo: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld. Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.

Restis en stoko kelkcentaj ekz. de la pac-numero 1935, enhavanta i.a. la belegan rakonton de Berta v. Süttner:

„Memorajo el la Franc-Germana Milito”.

Prezo: 0,30 gld. po 10 ekz. (2 resp. kup.).

Uzu ĝin en viaj grupoj kaj ĝojigu per ĝi viajn gekorespondantojn!!

La Esperantistoj revis havi gazeton redaktatan de profesiaj ĵurnalistoj. Ilia revo efektiviĝis!

Aperis:

NIA GAZETO

- o Monata.
- o La plej malkara.
- o Grandformata. Ilustrita.
- o Internacia kunlaborantaro.

Ĉefredaktoro: S. Grenkamp-Kornfeld.

Abonprezo: fr. fr. 15 = 1,5 guld.

Adreso: 29, Avenue de la Victoire Nice, Francujo.

En Amsterdam mortis S.ro P. Kat, 86 jara, fidela amiko de la Esp. movado, Kvankam li komencis la studadon nur je 80 jara aĝo, li fariĝis fervora Esperantisto. Dum la lastaj jaroj de sia vivo li plej ŝatis legi esperantajn librojn kaj gazetojn. Lia idealismo estu ekzemplo por ni ĉiuj!

PAŜO POST PAŜO.

Een volledige Esperanto-leergang
door

J. W. Minke en F. Boom-de Vries
1ste deeltje (150 pag.) f 0,75
2de deeltje (208 pag.) f 0,95

Verschenen bij:

N.V. Uitgevers Mij.
C. A. J. van Dishoeck

**Verkrijgbaar bij de redactie van
„La Juna Vivo”.**

(en bij de erkende boekhandelaren).

GRAVA PREZ-MALALTIGO!!!

Kursgvidantoj atentuu!!!

Unu el la plej bonaj rimedoj por lerni libere paroli estas prezenti simplajn teatraĵetojn.

Tial ni malaltigis la prezon de

„La Novaj Vestoj de la Reĝo”

(la teatraĵeto, kiu jam kelkfoje sukcesplene estas prezentita en diversaj lokoj, vidu paĝojn 12 kaj 20 en „L. J. V.”).

Antaŭe 1,20 gld. nun 0,50 gld. po 8 ekz. (4 respondekuponoj).

GRAVA PREZMALALTIĜO!

Aĉeteblaj ĉe la red. de „La Juna Vivo”:

BINDITA
mal-
nova nova
prezo
(en guld.)

Baghy: Viktimoj	3,10	1,65
” : Dancu Marionetoj	2,70	0,85
” : Hura	4,65	3,45
” : Preter la Vivo ...	1,65	1,10
” : Pilgrimo	1,65	1,05
Kalocsay: Lingvo Stilo		
Formo	2,25	0,95
” : Streĉita Kordo	2,85	1,60
” : Rimportretoj	2,25	0,65
” : Eterna Bukedo	5,10	3,00
Kalocsay-Madách: Tragedio de l’Homo	3,00	1,50
Kalocsay-Dante: Infero	5,50	2,85
Kalocsay-Hekler: Arthistorio	7,50	3,40
Kalocsay-Hekler: Arthistorio II	6,00	3,95
Kalocsay-Mussolini: Vivo de Arnaldo	1,65	0,95
Kalocsay-Waringhien: Parnasa Gvidlibro	2,50	1,35
Kalocsay-Waringhien: Plena Gramatiko de Esp.	4,75	3,55
Kalocsay: Hung. Antologio	7,00	3,95
Bleier-Kökény-Sirjaev: Enciklopedio de Esp. vol. I-II, ilustrita neilustrita en unu vol.	17,00 10,00	10,25 6,10
Asch-Lejzerowicz: La sorĉistino el Kastilio	2,50	1,35
Grenkamp-Brzekowski: Pri l’Moderna Arto	4,50	1,00
Forge: Mr. Tot aĉetas mil okulojn	2,85	1,60
Szilágyi-Centhon: La pentro-arto en la Malnova Hung	7,75	4,05
Szilágyi: Trans la Fabeloce ano	2,50	1,35
Totsche: De Paĝo al paĝo	2,00	1,20
Totsche: Dekdu Poetoj	2,00	1,25

Engholm: Homoj sur la tero

2,50 1,45

Engholm: Infanoj en Torento

1,75 0,90

Weinhengst: Tur Strato 4

2,25 1,45

Aldonu 10 % por sendkosto.

Abonu „**Verda Revuo**”. Sendependa gazeto pri arto, scienco kaj amuzo. Aperas monate. Jarabono 1 guld. Mendebla ĉe la administrejo: Wien VII, Hermannsgasse 31/26, Aŭstrio, kaj ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”, West-Graafdyk, (NH), Nederlando.

INSIGNOJ:

1. Simpla, verda stelo (0,20 gld.); 2. Stelo sur blanka fono (malgranda: 0,20 gld. — granda 0,25 gld.); 3. Ĉirkaŭ la verda stelo estas blanka rando (bela, granda: 0,30 gld.); 4. Granda stelo kun vorto „Esperanto”: (0,30 gld.); 5. Stelo sur ora fono kun nigra rando kun vortoj „Esperanto Internacia Lingvo” (belega, bonkvalita: 0,30 gld.); — La insignoj estas livereblaj kun pinglo, broĉo aŭ butono. — Ĉe la mendo oni indiku la deziratan. — Aldonu por sendkosto 0,05 gld.

ESPERANTAJ HISTORIETOJ I

de P. Frey.

La libro enhavas rakontetojn en tre simpla lingvo. Post komenca kurso ĉiu povas legi ĝin. 2500 libroj vendiĝis dum 7 monatoj. Prezo 0,40 ct.

Abonu tuj la monatan revuon

„FLANDRA ESPERANTISTO”

Interesa enhavo; facile komprenebla lingvo; aktuala, malmultekosta. Jarabono: 25 frankojn = 1,25 gld. Novaj abonantoj anoncu sin ĉe: Flandra Ligo Esperantista, Kortryk. Poŝtĉeko: 2321.50.

JARKOTIZO:

Ameriko: 0,70 dol.; **Aŭstrio:** 3,20 ŝil. **Britujo:** 3 ŝil.; **Belgujo:** 17 fr. fr.; **Bulgarujo:** 50 lev.; **Cehoslovakujo:** 16,50 Kĉs.; **Danujo:** 3 kr.; **Estonio:** 2,50 est. kr.; **Finnlando:** 30 finn. mk.; **Francujo:** 10 fr. fr.; **Germanujo:** 2 M.; **Hispanujo:** 5 pes.; **Italujo:** 8,3 ital. lir.; **Japanujo:** 2,50 jap. jen.; **Jugoslavo:** 30 din.; **Latvio:** 2,1 l.; **Norvegujo:** 2,7 kr.; **Polujo:** 3,6 zl.; **Portugalujo:** 15 port. esk.; **Svedujo:** 2,70 kr.; **Svisujo:** 2,1 sv. fr. **Argentino:** 2,40 pes.

LA LUMTURO DE ESPERANTO

Monata, Sendependa organo.
Multe da artikoloj estas en franca kaj esperanta lingvoj. Jarabono 10 fr. fr.
Redaktejo, Villa Zamenhof, Sisteron.
FRANCLANDO

**„IDEALA ESPERANTO
BIBLIOTEKO”**

eldonas:

BLUA SANGO Willy Wood.
LA MOREA PERLO D. Simson.
IRISIS H. 't Sas.

SUB LA VITRA

KUPOLO L. v. Weddingen.

Ĉiuj interesaj romanoj, 200 p.**Prezo nur po f 0,50.**

(plus f 0,20 por sendkosto).

Aĉetante la 3 unuajn ekz. oni pagas
nur f 1,35 (f0,60).

**Mendu viajn librojn ĉe la redakcio
de „La Juna Vivo”!**

BONVOLU SENDI LA MONON POR „LA JUNA VIVO”:

Aŭstrio: S.ro Scheibenreiter, Hermannsgasse 31/26, Wien VII.

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

Britlujo: The British Esp. Asociation, Inc. 142 High Holborn, London W.C.I.

Cehoslovakujo: L. J. Svoboda, Plzen „U Zvonu”, ĝironumero 14171 Praha.

Cehoslovakujo: Esperanto Asocio, Praha XIX, Uralské nám. 447. Poŝtĉekkonto 12.371.

Ĉinujo: Ĉina Esp.-Librejo, No. 14, lane 169, Carter Road, Sanhajo.

Danujo: S.ino M. Jensen, Galtrup, Erslev, ĝironumero 44593.

Estonio: Esperanto-Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.

Finnlando: Esperanto-Instituto de Finnlando, Kluuvikatu 5, Helsinki.

Francujo: S.ro Matthieu, Dijon, 27, Place de la République, Côte d' Or.

Japanujo: Japana Esp.-Instituto, Tokio, Hongo-Motomaĉi. Poŝtĉekkonto: Tokio 11325.

Jugoslavo: Vilim Buk, Knijgotiskara, Sl. Brod. Ĉeko Nro. 37.556.

Latvujo: Ludmila Jevsejeva, Riga, Reformatoru, iela 14, dz. 5.

Norvegujo: Norvega Esp.-Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappelsgate 5, Hamar.

Polujo: Librejo-Eldonejo, Esp. Fako, S.ro N.Szapiro, Warszawa, Nowolipki Nr. 8. Poŝtĉekkonto: Warszawa 16.562.

Svedujo: John Karlsson, Berga, Vasterhaninge. Sveda ĝironumero 72295.

Svisujo: S.ro R. A. Dasen, 19a Avenue Riant-Parc, Genève ĝir. 1.6256.

Usono: Amerika Esp.-Instituto, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!)